



The Esperanto Society of New York invites you to its annual Zamenhofa Festo!

WHEN: Friday, December 19, 2003, 6:30-9:00 pm



WHERE: United Federation of Teachers,
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAM: Buffet dinner! Zamenhofaĵoj! Singing! Fun!
Se vi deziras, alportu viajn rakontojn pri Zamenhof.
(Election of officers for the year 2004 at 7:30 pm)



MENU: Feel free to bring a main or side dish, dessert,
or beverage to share. Please call Rochelle F.
Grossman at 718-457-1490 to see what we need. ★



Protokolo de la kunveno de la 21-a de novembro 2003

Ĉi-jare, kiel ĉiu-jare, de la novembra kunveno, nia Societo okazigis sian Malfermitan Domon. Ĉeestis 16 personoj, du personoj la unuan fojon: Michael BOTWIN kaj Joseph KASENCHAK.

Antaŭ la kunveno, Tomaso ECCARDT eklernis kiel uzi la novstilan projekciilon por montri la vidbendan programon. La komandejo estas eta ŝranko en la ĉambro. La ekrano malsupreniras el la plafono per elektro. La projekciilo kunligiĝas al la plafono, en la mezo de la ĉambro.

Je 7:07 ptn, Tomaso oficiale malfermis la kunvenon.

Je 7:08 ptn, Rochelle F. GROSSMAN deklamis la amuzan rakonton de la patrino de la musoj: la patrino devis iri al la merkato por aĉeti manĝaĵon por siaj infanoj. Ŝi bojis kiel hundo al minacanta kato, kaj la kato foriris. Ŝi diris al siaj infanoj, ke estas bone scipovi paroli fremdan lingvon.

Je 7:10 ptn, Tomaso LEONG komencis paroli pri vojaĝado per Esperanto. Li ŝparis monon, plibonigis sian kapablon paroli kaj kompreni Esperanton, kaj faris amikecojn. Kiam li komencis lerni Esperanton, li praktikis la lingvon ĉe la Universala Kongreso. Li rekomendis, ke oni uzu aerlinio de tria lando, ĉar oni povas halti kaj viziti tiun landon preskaŭ senpage.

Ekzemple, li flugis al Italio per KLM, kaj li vidis la lokojn en Nederlando sen pagi pli por la halto. Alia ekzemplo estas, ke li bezonis helpon en lando, kie li ne povis uzi usonajn dolarojn, kaj loka esperantisto lin helpis.

Je 7:25 ptn, mi, Stuart GREEN, komencis paroli pri kiel Esperanto unikas. Mi menciis la 16 regulojn, la fakton, ke la lingvo estas planita, kaj la simplecon kaj logikecon de la lingvo. Mi ankaŭ parolis pri la trajtoj de la personoj, kiuj parolas la lingvon: ke ili estas pacamantaj, inteligentaj, legemaj, kaj ke ili zorgas pri homaj rajtoj kaj demokratio tra la tuta mondo.

Je 7:42 ptn, Pamela LIEBER komencis paroli pri libroj eldonitaj en Esperanto. Ŝi ankaŭ menciis la fakton, ke esperantisto, kiu estas verkisto, iam eblas uzi vortojn de Esperanto eĉ en verkoj ne skribitaj en Esperanto. Ekzemple, unu karaktero vokas alian per "Stultulo." Ŝi montris librojn pri ludteorio, religio, lingvoj, homaj rajtoj, tertremoj, Ĉinio, kaj eĉ Esperanto.

Je 7:57 ptn, Tomaso demandis, ĉu estas eraroj, aŭ en la *Prismo*, aŭ en la protokolo de oktobro. La protokolo estis akceptata sen ŝanĝoj. Rochelle diris, ke oni devas ŝanĝi parton de la adreso al "2nd Floor, Room A."

Je 7:59 ptn, mi menciis, ke estas eraro,

kiu aperas en mia artikolo en la novembra *Prismo* pri la bahaa festo. Angle, la nomo de la organizo, kiu aranĝis la feston, estas "Baha'i Race Unity Committee of Long Island." Mia unua traduko de tiu nomo estas "Bahaa Rasa Unueca Komitato de Longinsulo." La persono, kiu redaktis la artikolon, vidis mian tradukon de la nomo, evidente miskomprenis ĝin kaj pensis, ke la signifo de la nomo estas "Long Island Unity Committee of the Baha'i Race." La nomo aperis en *Novjorka Prismo* de novembro 2003 kiel la "Longinsula Unueca Komitato de la Bahaa Raso." Kiam mi legis tion, mi pensis, ke tiu ĉi estas terura miskompreno, ĉar la Bahanoj ne estas raso. La bahaa kredo estas religio. Krome, la unueco estas tiu de la tuta homa raso, ne nur la Bahanoj. Do, mi proponis, ke pli ĝusta traduko de la nomo estas la "Bahaa Rasunueca Komitato de Longinsulo." Mi diris, ke la kulpo estas la mia, ĉar mia unua traduko ne sufiĉe klaras. Kiam mi diskutis la aferon, aliaj personoj diris, ke eĉ en la origina angla nomo, ne klaras, ĉu "Race" kunligiĝas kun "Unity," ĉu kun "Baha'i."

Je 8:03 ptn, Marta BERGONZOLI kondukis la aferojn de la Kandidatiga Komitato. Rochelle kaj mi jam respondis jese

(daŭras je paĝo 2)

Protokolo (daŭras de paĝo 1)

al ŝi, ke ni volantas daŭrigi en niaj nunaj postenoj. Marta demandis al Tomaso ECCARDT, Tomaso LEONG, kaj Sofiya SOSKINA, kiuj ankaŭ respondis jese. Oni supozas, ke Jim MEDRANO daŭrigos kiel Redaktoro de *Novjorka Prismo*. Nijl BLONSTEIN diris jes, sed "duone," ĉar povas esti problemo se li transloĝiĝos venontjare. Do, Maki SANO volontulis servi en neoficiala posteno de "VICprogram-direktoro." Ŝi postulis, ke "VIC" estu en majusklaĵoj literoj.

Je 8:08 ptm, Tomaso ECCARDT menciis Zamenhofan Feston. Li diris, ke personoj devas skribi sur liston, kiajn manĝaĵojn ili intencas kunporti al la festo. Tamen, tio ĉi ne okazis.

Je 8:09 ptm, Rochelle anoncis, ke ŝi ricevis leteron de Hans BAKKER, germana esperantisto, pri Londoni B. KELLY, afrika Esperantisto, kiu intencas studi en Novjorko kaj serĉas loĝejon.

Je 8:11 ptm, Irene CINSBERG distribuis kopiojn de artikolo de la *New York Times*, kie oni menciis ŝian nomon. Irene estas advokato, kies laboro temas pri konfliktoj inter domposedantoj kaj okupantoj.

Je 8:14 ptm, Tomaso ECCARDT funkciigis la projektilon, kaj la ĉeestantoj rigardis la 20-jar-aĝan, 30-minutan vidbendon, kie la nun forpasinta Steve ALLEN intervjuis esperantiston Bill HARMON. Tiu ĉi vidbendo daŭre estas la fokuso de nia

programo ĉe nia Malfermita Domo. Bedaŭrinde, ni ne havis la tempon por aŭskulti la kanton *Jen Nia Mondo* ĉe la fino de la vidbendo.

Je 8:43 ptm, Marta parolis pri siaj spertoj. Ŝi diris, ke kiam ŝi parolas Esperanton, ŝi neniam sentas sin esti kiel "malinteligenta fremdlandano." Ŝi ŝategas fari siajn proprajn vortojn, kiel eblas en Esperanto. Antaŭ multaj jaroj, ŝi transloĝiĝis el Kolombio al Novjorko. Ŝi laboris ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kie Rochelle estis ŝia ĉefo.

Je 8:45 ptm, Nijl parolis pri Pasporta Servo.

Je 8:48 ptm, Tomaso ECCARDT parolis pri klubaj eventoj okazante ĉiu-jare en nia Societo: kunvenoj, piknikoj, vizitoj al parkoj, la marhaveno, Unuiĝintaj Nacioj, kaj aliaj lokoj. Je 8:50 ptm, li dankis al ĉiuj ĉeestantoj pro veni al la Malfermita Domo, kaj li invitis al ĉiuj iri al la restoracio "Cafe World" por manĝi kaj trinki. ★

Protokolis: Stuart GREEN

Feliĉan Novjaron!
2004

Ho Zamenhof

(laŭ la melodio de O Tannenbaum)

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
verdegas via lingvo!

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
verdegas via lingvo!

Ne taŭgas nur en okcident' –
prosperas ĝi en orient'.

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
verdegas via lingvo!

Ho Esperant', ho Esperant',
via kreinto saĝis!

Ho Esperant', ho Esperant',
via kreinto saĝis!

La vort-armilon faris li –
por paco nun batalas ni.

Ho Esperant', ho Esperant',
via kreinto saĝis!

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
de vi ni povas lerni.

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
de vi ni povas lerni.

Kompreno viaj kaj esper'
inspiras sur la tuta ter'.

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
de vi ni povas lerni. ★

Verkis Thomas ECCARDT



Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Decembro

19

ZAMENHOFA FESTO

Buffet dinner; elections

*Friday, 6:30 pm
at UFT*

Januaro 2004

4

Tagmanĝo

*Dimanĉon, 1:00 ptm
ĉe IBM*

(Limdato por kontribuadoj por *Prismo* 130)

16

ESNY KUNVENO

Vendredo, 6:30 ptm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

IBM Plaza

La 7-an de decembro, pli malpli kvin
ESNY klubanoj neformale kunvenis en
IBM Plaza. Oni parolis pri monda politiko
kaj la venonta Zamenhofa festo. ★

– Tom ECCARDT



"Monda politiko" ĉe IBM Plaza.

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grosman
(718) 457-1490

Protokolisto
Stuart Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Leong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktoro
Neil Blonstein
(212) 663-2020

Novjorka Prismo

Numero 129 – Decembro 2003
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuadojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2003 Esperanto Society of New York